

07 EKSPERIMENTO DE PROFESORO ROUSS

Ĉeestis speciale: ministro por internaj aferoj, justic-ministro, polica prezidanto, aro da deputitoj, kelke da altrangaj oficistoj, eminentaj juristoj, elstaraj sciencistoj kaj memkomprene ankaŭ pres-reprezentantoj; ĉar tiuj devas ĉion ĉeesti.

„Sinjoroj,” komencis profesoro de la harvarda universitato C. G. Rouss, nia renoma usona samlandano, „eksperimento, kiun mi estos montri al vi, baziĝas sur antaŭaj laboroj de granda aro de miaj kleregaj kolegoj kaj kunlaborantoj; indeed, je la tuta afero estas jam nenio nova, kaj hm, really, ĝi estas.... malnova vešto,” li ĝoje impetis, rememorinte la ĝustan vorton. „Nur la metodo de uzado kaj hm, kaj la praktika uzebleco de kelkaj teoriaj experiences estis objekto de mia laboro. Mi petas plej multe sinjorojn kriminalistojn, ke ili prijuĝi la aferon laŭ sia practice. Well.

Do la tuta afero estas la jena: mi diros al vi vorton, kaj vi devas diri al mi alian vorton, kiun vi tiuomente ekpensos, eventuale ĝi estu nonsens, hm, idiotaĵo, mi opinias, sensencaĵo. Kaj fine mi diros al vi laŭ la vortoj, kiujn vi donos al mi, kion vi havas en la kapo, je kio vi pensas kaj hm, kaj kion vi kaĉas. Ĉu vi komprenas al tio? Mi ne ekspliki al vi theoretically; tio estas ideo-asociadoj, subpremitaj imagoj, iom da sugesto kaj tiaj aferoj. Mi estos ege mallonga: oni devas el - hm, well, ekskluzivi volon kaj rezonadon; tiel reproduktiĝas subkonsciaj connexions kaj el tio mi ekkoni, kio - kio - “ La fama profesoro vortpalpis. „Well, what's on the bottom of your mind.” „Kio estas sur fundo de via animo,” sufloris iu el la aŭditorio. „Ĝuste tiel,” diris C. G. Rouss kontente. „Nur vi devas diri automatically, kio al vi tiuomente venos sur lang-pinton, sen ĉia control kaj rezervo. Mia business poste estos analajzi viajn imagojn. That's all. Do mi al vi volas tion montri je iu kriminala kejzo, hm, kazo kaj poste je iu el la aŭditorio, kiu estos sin anonci.

07 EXPERIMENT PROFESORA ROUSSE

Přítomni byli zvláště: ministr vnitra, ministr spravedlnosti, policejní prezident, řada poslanců, několik vysokých úředníků, vynikající právníci, přední učenci a ovšem i zástupci tisku; neboť ti musejí být při všem.

„Pánové,” začal profesor harvardské univerzity C. G. Rouss, náš proslulý americký krajan, „experiment, který já vám budu ukázat, spočívá na starších prácech velké řady mých učených kolegů a spolupracovníků; indeed, na celé věci není už nic nového a eh, really, je to... Je to stará vesta,” vyhrkl radostně, vzpomenuv si na to pravé slovo. „Jenom ta method užití a eh, a praktická upotřebitelnost některých teoretických experiences byla obžektem mé práce. Já prosím nejvíc pány kriminalisty, aby oni věc posoudili podle své practice. Well.

Tedy celá věc je ta: já vám řeknu slovo, a vy mně musíte říci jiné slovo, které vás v ten moment napadne, at' je to třeba nonsens, eh, blbost, já míním nesmysl. A nakonec já vám podle těch slov, co vy mně dáte, řeknu, co vy máte v hlavě, na co vy myslíte a eh, a co vy skrýváte. Rozumíte vy tomu? Já vám to nebudu vyložit theoretically; to jsou asociace, potlačené představy, trochu sudžesce a takové věci. Já budu moc krátký: to se musí vy – eh, well, vyloučit vůle a úvaha; tím se vybaví podvědomé connexions a já z toho budu poznat, co – co –” Slavný profesor tápal po slově. „Well, what's on the bottom of your mind.” „Co je na dně vaší duše,” napověděl někdo z auditoria. „Docela tak,” děl C. G. Rouss uspokojeně. „Vy jenom musíte říkat automatically, co vám v ten moment přijde na jazyk, beze vší control a ryzervy. Můj byznys potom bude, analajzovat vaše představy. That's all. Tak já vám to chci ukázat na jednom kriminálném kejzu, eh, případu, a potom na někom z auditory, kdo se bude přihlásit.

Well, sinjoro direktoro de polico estos diri al ni, kiu kejzo estas kun tiu viro. Mi petas."

Sinjoro policprezidanto leviĝis kaj diris: „Sinjoroj, viro, kiun vi post tempeto ekvidos, estas Vincento Suchánek, domproprietulo kaj profesia seruristo el Záběhlice. Ni havas lin jam unu semajnon en polica preventiva reteno pro suspekto, ke li murdis aŭtodroškiston Jozefon Čepelka, kiu malaperis antaŭ du semajnoj. Motivoj pro la suspekto estas: aŭto de la malaperinta Čepelka estis trovita en remizo de la arrestita Suchánek; sur la stirilo kaj sub la sidloko de la ŝoforo estas spuroj post la homa sango. La arrestito memkomprene tute ĉion neas; li asertas, ke la aŭton de Čepelka li aĉetis por ses mil, ĉar li mem volas profesii la aŭtodroškadon. Ni konstatis, ke la malaperinta Jozefo Čepelka efektive parolis pri tio, ke ĉion li forjetegos, vendos sian malnovan veturilon kaj iros ien ŝofori; sed alian spuron post li ni ne havas. Ĉar plua materialo ne ekzistas, estas la arrestita Suchánek morgaŭ transdonata al enket-reteno en Pankraco. Mi akiris permeson, ke nia renoma samlandano, profesoro C. G. Rouss, realigu sian eksperimenton; se deziras sinjoro profesoro ..." „Well," diris la profesoro, diligente notanta, "vi lin, mi petas, lasu veni ĉi tien."

Je mansigno de la policprezidanto alkondukis policisto Vincenton Suchánek; li estis morna ulo miene montranta, ke ĉiuj ien enrampu al li; kio lin koncernas, li estas firme decidiĝinta ne lasi sin.

"Iru ĉi tien, vi," bruskis lin severe C. G. Rouss, "mi vin demandos nenion. Mi diros al vi nur vortojn, kaj vi devas diri la unuan vorton, kiu vin trafis, ĉu komprenas vi? Do, atentu:

Glaso."

„Merdo," diris sinjoro Suchánek obstinege.

„Aŭdu, Suchánek," rapidis diri la policprezidanto, "se vi ne estos dece respondanta, oni tuj forkondukos vin al la enketado, komprenite? Kaj oni lasos vin tie tutan nokton. Atentu! Ankoraŭ foje."

Well, pan direktor od police nám bude říkat, co je to za kejz s tím mužem. Já prosím."

Pan policejní prezident povstal a řekl: „Pánové, muž, kterého za chvíli uvidíte, je Čeněk Suchánek, domkář a vyučený zámečník ze Záběhlic. Máme ho už týden v policejní vazbě pro podezření, že zavraždil autodrožkáře Josefa Čepelku, který zmizel před čtrnácti dny. Důvody podezření jsou: auto zmizelého Čepelky bylo nalezeno v kůlně zatčeného Suchánka; na volantu a pod sedadlem řidiče jsou stopy po lidské krvi. Zatčený ovšem na celé čáre zapírá; tvrdí, že auto od Čepelky koupil za šest tisíc, protože sám chce provozovat drožkářství. Zjistili jsme, že zmizelý Josef Čepelka skutečně mluvil o tom, že vším praští, prodá svůj starý vůz a půjde někam za šoféra; ale jiné stopy po něm nemáme. Protože další materiál není, má být zatčený Suchánek zítra odevzdán do vyšetřovací vazby na Pankrác. Vyžádal jsem si dovolení, aby s ním nás slovutný krajan profesor C. G. Rouss provedl svůj experiment; přeje-li si pan profesor..."

„Well," řekl profesor, který si pilně dělal poznámky, „vy ho, prosím, necháte jít sem."

Na pokyn policejního prezidenta přivedl strážník Čeňka Suchánka; byl to zamračený chlapík s výrazem naznačujícím, aby mu všichni vlezli někam; pokud je na něm, že je pevně odhodlán nedat se.

„Pojďte sem, vy," spustil na něj přísně C. G. Rouss, „já se vás nebudu na nic ptát. Já vám jenom budu říkat slova, a vy musíte hned říkat první slovo, které vás napadlo, rozumíte vy? Tak dávejte pozor:

Sklenice."

„H...o," pravil pan Suchánek zarytě.

„Poslouchejte, Suchánu," řekl honem policejní prezident, „nebudete-li pořádně odpovídat, odvedou vás hned k výslechu, rozumíte? A nechají si vás tam celou noc. Dejte si pozor! Ještě jednou!"

„Glaso,” diris denove profesoro Rouss.

„Biero,” murmuris Suchánek.

„Jen vi vidas, viro,” diris la fama profesoro, „tiel ĝi estas ege bone.” Suchánek malkonfide ekrigardis. Ĉu ne enestas iu trompaĉo?

„Strato,” diris la profesoro.

„Veturiloj,” poste Suchánek malvolonte.

„Vi devas pli rapide. Dometo!”

„Kampo.”

„Tornilo!”

„Latuno.”

„Ege bone.” Šajnis, ke sinjoro Suchánek jam ne havas oponojn kontraŭ la ludo. „Panjo!”

„Onklino.”

„Hundo!”

„Budo.”

„Soldato! ”

„Kanonisto.” Tiel ĝi rapide sinsekvis, ĉiam pli rapide, sendube ĝi komencis amuzi sinjoron Suchánek; ĝi rememorigis lin pri la atutado. Dio, kion li dum la ludo rapidpase rememoris!

„Vojo,” jetis C. G. Rouss en spirmanka ritmo.

„Soseo.”

„Prago!”

„Beroun.”

„Kaši!”

„Enterigi.”

„Purigi!”

„Makuloj.”

„Ĉifono!”

„Sako.”

„Hakfosilo!”

„Gardeno.”

„Kavo!”

„Sklenice,” řekl znova profesor Rouss.

„Pivo,” zabručel Suchánek.

„Tak vy vidíte, muži,” děl slovutný profesor, „tak je to moc dobře.” Suchánek nedůvěřivě vykoukl. Není v tom nějaký podfuk?

„Ulice,” řekl profesor.

„Vozy,” na to Suchánek neochotně.

„Vy musíte rychleji. Chalupa!”

„Pole.”

„Soustruh!”

„Mosaz.”

„Moc dobře.” Zdálo se, že pan Suchánek už nemá námitek proti této hře. „Maminka!”

„Teta.”

„Pes!”

„Bouda.”

„Voják!”

„Kanonýr.” Tak to šlo ráz na ráz, stále rychleji; nejspíš to pana Suchánka začalo bavit; připomínalo mu to trumfování karet. Bože, na co si při téhle hře letmo vzpomínal!

„Cesta,” hodil mu C. G. Rouss v bezoddyšném tempu.

„Silnice.”

„Praha!”

„Beroun.”

„Schovat!”

„Zahrabat.”

„Pucovat!”

„Fleky.”

„Hadr!”

„Pytel.”

„Motyka!”

„Zahrada.”

„Jáma!”

„Barilo!"

„Kadavro!"

Nenio.

„Kadavro," ripetis la profesoro insiste. „Do vi ĝin enterigis ĉe barilo, ĉu?"

„Mi diris nenion," eksplodis sinjoro Suchánek.

„Vi ĝin enterigis ĉe barilo en via ĝardeno," ripetis rigore C. G. Rouss.

„Vi lin mortigis dumvoje al Beroun. Vi višis la sangon en la ĉaro per unu sako. Kion do vi faris kun la sako?"

„Tio ne estas vero," kriis Suchánek, "la veturilon de sinjoro Čepelka mi aĉetis! Mi lasos min de neniu ĉikani..."

„Atendu, viro," diris Rouss. „Do mi petos, ke policeman iru tien rigardi. Tio jam ne estas mia byznis. Tiu viro iru eksteren. Mi petas, sinjoroj, ĝi daŭris dek sep minutojn. Tio estis tro rapide. Ĝi estis malsaga kejz. Plej multe ofte ĝi daŭras horon. Do mi ŝatus peti, ke volu veni iu el la sinjoroj kaj mi donos al li vortojn. Tio daŭros ege longe, ĉar mi ne scias, kiun secret havas tiu sinjoro, kiel oni tion diras?"

„Sekreto," sufloris iu el la aŭditorio.

„Sekreto," ekĝojis nia eminenta samlandano, "mi konas, tio estas unu opero. Tio konsumos multe da nia tempo, antaŭ ol tiu sinjoro povos malsekretri al ni sian karakteron, sian pasintecon, kaj siajn plej kaŝatajn ajdijs."

„Ideojn," sufloris voĉo el la publiko.

„Well. Mi vin petas, sinjoroj, kiu estos lasi sin analajzi?"

Estiĝis paŭzo; iu el la ĉeestantoj ekridaĉis; sed neniu moviĝis.

„Mi petas," ripetis C. G. Rouss. "Ja ĝi ne doloros."

„Iru vi, sinjoro kolego," flustris ministro por internaj aferoj al justic-ministro.

„Iru tien kiel reprezentanto de via partio," mokincitis deputito deputiton.

„Plot."

„Mrtvola!"

Nic.

„Mrtvola," opakoval profesor naléhavě. "Tak vy jste ji zahrabal u plotu, že?"

„Já jsem nic neřekl," vybuchl pan Suchánek.

„Vy jste ji zahrabal u plotu na vaši zahradě," opakoval tvrdě C. G. Rouss. "Vy jste ho zabil cestou do Berouna. Vy jste utíral tu krev na té káře jedním pytlem. Copak jste vy udělal s tím pytlem?"

„To není pravda," křičel Suchánek, „já jsem ten vůz od pana Čepelky kupil! Já se nenechám od nikoho tahat..."

„Počkejte, muži," řekl Rouss. "Tak já budu prosit, aby se tam šli policeman podívat. To už není můj byznys. At' jde ten muž ven. Já prosím, pánové, to trvalo sedmnáct minut. To bylo moc rychle. To byl hloupý kejz. Nejvíc často to trvá hodinu. Tak já bych rád prosil, aby chtěl přijít někdo z pánu a já mu budu dávat slova. To bude trvat moc dlouho, protože já nevím, co ten pán má za secret, jak se to říká?"

„Tajemství," napověděl někdo z auditoria.

„Tajemství," zaradoval se náš vynikající krajan, „já znám, to je jedna opera. To nám vezme mnoho času, než nám ten pán bude prozradit svou povahu, svou minulost a své nejvíc skryté ajdyje."

„Myšlenky," napověděl hlas z publika.

„Well. Já vás prosím, pánové, kdo se bude dát analajzovat?"

Nastala pauza; někdo z přítomných se uchechtl; ale nikdo se nehnul.

„Já prosím," opakoval C. G. Rouss. "Vždyť to nebude bolet."

„Jděte vy, pane kolego," šeptal ministr vnitra ministru spravedlnosti.

„Jdi tam jako zástupce své strany," rýpal poslanec do poslance.

„Sinjoro sekcia ĉefo, bonvolu,” instigis altranga oficisto kolegon el la alia ministerio.

Jam ĝi komenciĝis esti iel ĝena; neniу el la ĉeestantoj leviĝis.

„Mi petas, sinjoroj,” diris la usona sciencisto la trian fojon, „ĉu eble vi timas, ke vi estos malsekretiĝi?” Tiam turniĝis ministro por internaj aferoj dorsen kaj eksiblis: „Do iu iru, sinjoroj!”

En fono de la aŭditorio iu modeste ektusis kaj leviĝis; li estis seka kaj iom trivita olduleto kun laringo ekskitite moviĝanta. „Mi... hm,” li diris timide, „do kiam neniу, do mi permesas al mi - iel ...”

„Venu ĉi tien,” interrompis lin la usonano estre, „ĉi tie sidiĝu. Vi devas diri, pri kio venos al la vi unua ideo. Vi ne darfus mediti, vi devus ekbabili mechanically, ne sciante mem, kion. Vi komprenas?”

„Mi petas,” diris kompleze la eksperimenta viro, iom ĝenata de la aŭditorio tiom gravsignifa; poste li ektusis kaj angore palpebrumis kiel ekzamenato.

„Arbo,” ekpafis je li la sciencisto.

„Fortega,” flustris la olduleto.

„Kiel mi petas?” demandis la sciencisto iel ne komprenante. „Arbara grandulo,” klarigis la viro singene. „Ha, tiel. Strato!”

„Strato... strato en solena robo,” diris la vireto.

„Kion vi per tio opinias?”

„Mi petas, solenon. Aŭ sepulton.”

„So, do vi estu dironta nur Soleno. Laueble per unu vorto.”

„Jes, mi petas.”

„Do plue: Komerco.”

„Prosperas. -Krizo de nia komerco. Politika negoco.”

„Hm. Ofico.”

„Mi petas, kiu?”

„Egale. Diru iun vorton, rapide!”

„Se vi moštus eble diri oficoj...”

„Well. Oficoj!”

„Kompetentaj,” impetis ĝoje la vireto.

„Pane sekční šéfe, račte,” ponoukal vysoký úředník kolegu z jiného ministerstva.

Už to začalo být jaksi trapné; nikdo z přítomných se nezvedl.

„Já prosím, pánové,” pravil americký učenec potřetí, „snad se vy nebojíte, že vy se budete prozradit?” Tu se obrátil ministr vnitra dozadu a zasykl: „Tak přece jděte někdo, pánové!”

V pozadí auditoria někdo skromně zakašlal a povstal; byl to vyschlý a poněkud ošoupaný stařík s ohryzkem rozčileně se pohybujícím. „Já – ehm,” řekl plaše, „když tedy někdo, tak já si dovolím – jaksi...”

„Pojďte sem,” přerušil ho Amerikán velitelsky, „tady si sedněte. Vy musíte říkat, co vás první napadne. Vy nesmíte přemýšlet, vy musíte plácnow mechanicaally, ani sám nevíte co. Vy rozumíte?”

„Prosím,” řekl ochotně pokusný muž, trochu tísněn auditoriem tak významným; načež odkašlal a úzkostlivě mrkal jako maturant.

„Strom,” vystřelil na něj učenec.

„Mohutný,” zašeptal stařík.

„Jak prosím?” ptal se učenec, jaksi nechápaje. „Lesní velikán,” vysvětloval muž ostýchavě. „Ach tak. Ulice!”

„Ulice ... ulice v slavnostním hávu,” děl mužík.

„Co tím míníte?”

„Prosím slavnost. Nebo pohřeb.”

„So. Tak vy máte říci jenom slavnost. Pokud možno jedním slovem.”

„Ano prosím.”

„Tak dál: Obchod.”

„Vzkvétá. Krize našeho obchodu. Politický kšeфт.”

„Hm. Úřad.”

„Prosím který?”

„To je jedno. Rekněte nějaké slovo, rychle!”

„Kdybyste ráčil snad říci úřady...”

„Well. Úřady!”

„Příslušné,” vyhrkl radostně mužík.

„Martelo!"

„Tenajlo. Tiri respondon tenajle. Li frakasis per martelo lian kapon."

„Curious," murmuris la sciencisto.

„Sango!"

„Sangruĝiĝi. La sango senkulpe verŝita. Historio per sango skribita."

„Fajro!"

„Per fajro kaj glavo. Brava fajroestingisto. Fajra parolo. Mene tekel."

„Kia stranga kejzo," diris la profesoro embarasite. „Do ankoraŭ foje. Vi, viro, vi devas diri nur la unuan imagon, sciate? Nur tion, kio riveligas al vi automatically, kiam vi aŭdas la vorton. Go on. Mano!"

„Frata aŭ helpa. Ĝi firme tenas standardon. Kun pugnigitaj manoj. Malparaj manoj. Frapi la fingrojn."

„Okuloj!"

„Okuloj de l' juĝpova publiko. Salo en okuloj. Depreni membranojn. Vidinta atestanto. Sablo en okulojn. Senkulpaj infan-okuletoj. Sapumi la okulojn."

„Ne tiom multe! Biero!"

„Akrogusta lagero. Demono alkoholaĵo."

„Muziko!"

„Muziko de estonteco. Elprovita kapelo. Nacio de muzikantoj. Ravaj sonoj. Koncerto de grandpotenco. Ŝalmoj de paco. Naciaj himnoj."

„Botelo!"

„Vitriolo. Malfeliĉa amo. En hospitalo ĝi mortis dum teruraj doloroj."

„Veneno!"

„Per veneno kaj galo. Puto-venenado."

C. G. Rouss ekgratis la kapon. „Never heard that. Do denove, mi petas. Mi vin sinjoroj volus atentigi, ke ĉiam oni komencas de... hm, tiaj plain, ordinaraj aferoj, por trovi la ĉefan interest kaj profession de tiu viro. Do plue: Konto!"

„Kladivo!"

„Kleště. Tahat odpověď kleštěmi. Rozbil mu kladivem hlavu."

„Curious," bručel učenec.

„Krev!"

„Rdít se do krve. Krev nevinně prolitá. Dějiny psané krví."

„Oheň!"

„Ohněm a mečem. Čacký hasič. Plamenná řeč. Mene tekel."

„To je divný kejz," řekl profesor zaraženě. „Tak ještě jednou. Vy muži, vy musíte říkat jenom tu první představu, víte? Jen to, co se vám automatically vybaví, když slyšíte slovo. Go on. Ruka!"

„Bratrská nebo pomocná. Třímá prapor. Se zaťatými pěstmi. Nečisté ruce. Klepnout přes prsty."

„Oči!"

„Oči soudné veřejnosti. Sůl v očích. Sejmout blány. Očitý svědek. Písek do očí. Nevinná dětská očka. Vytřít zrak."

„Ne tak mnoho! Pivo!"

„Řízný ležák. Démon alkohol."

„Hudba!"

„Hudba budoucnosti. Osvědčená kapela. Národ hudebníků. Luzné zvuky. Koncert velmocí. Šalmaje míru. Národní hymny."

„Láhev!"

„Vitriol. Nešťastná láska. V nemocnici za strašných bolestí podlehla."

„Jed!"

„Jedem a žlučí. Otravování studní."

C. G. Rouss se zadrbal na hlavě. „Never heard that. Tak znova, prosím. Já bych vás, pánové, chtěl upozornit, že se vždycky začíná od ... eh, od takových plain, obyčejných věcí, aby se našel ten hlavní interest a profession toho muže. Tak dál: Účet!"

„Konto de historio. Finkonti kun malamikoj. Ĝi debetas konton de niaj rivaloj."

„Hm. Papero!"

„Papero ruĝigas pro honto," deklaris la vireto energie. „Biloj. Papero toleras ĉion."

„Bless you," diris la sciencisto indigna. "Ŝtono!"

„Ĵeti ŝtonon. Tomboŝtono. Veĉnaja pamjat," diris arde la eksperimentata viro. „Ave, anima, pia!"

„Veturilo!"

„Triumfa veturilo. Radegoj de l' sorto. Ambulanca veturilo. Riĉe dekorita veturilo kun alegoria sceno."

„Ha," ekvokis C. G. Rouss. "That's it! Horizonto!"

„Nubplena," diris la maljunuleto kun vigla plezuro. „Novaj nubo sur politika horizonto. Mallarĝa horizonto. Malfermadi novajn horizontojn."

„Armiloj!"

„Nehonestaj armiloj. Plenarmitaj. Kun flirtantaj standardoj. Invadi dorsen. Venenita sago," vortmuelis la eksperimenta viro entuziasme.

„El la batalo ni ne retiriĝos. Bataltumulto. Balotbatalo."

„Elemento!"

„Furiozantaj elementoj. Elementa rezisto. Riproĉindaj elementoj. Živila junaci! Živio!"

„Do sufiĉe," retenis lin C. G. Rouss. „Homo, vi estas ĵurnalisto, ĉu?"

„Jes, mi petas," diris la eksperimenta viro fervore. "Jam tridek jarojn. Mi estas redaktoro Vašátko."

„Mi dankas," riverencis lakone nia eminenta usona samlandano.

„Finished, gentlemen. Per imago-analajzado de ĉi tiu viro - hm, ni konstatus, ke li estas unu ĵurnalisto. Mi opinias, ke estus superflue fari la experimento plu. It would only waste our time. Mi petas, la eksperimento ne sukcesis. So sorry, gentlemen."

„Účet dějin. Zúčtovat s nepřáteli. Spadá na účet našich odpůrců."

„Hm. Papír!"

„Papír se rdí hanbou," prohlásil mužík energicky. "Cenné papíry. Papír snese všecko."

„Bless you," děl učenec nakvašeně. "Kámen!"

„Hodit kamenem. Kámen náhrobní. Věčnaja pamět," řekl pokusný muž vřele. „Ave, anima pia."

„Vůz!"

„Triumfální vůz. Kolesa osudu. Vůz záchranné stanice. Bohatě dekorovaný vůz s alegorickou scénou."

„Aha," zvolal C. G. Rouss. „That's it! Obzor!"

„Zachmuřený," řekl stařík s živým potěšením. "Nové mraky na politickém obzoru. Uzoučký obzor. Otevírat nové obzory."

„Zbraně!"

„Nekalé zbraně. V plné zbroji. S vlajícími prapory. Vpadnout do zad. Otrávený šíp," drmolil pokusný muž nadšeně. „Z boje neustoupíme. Bitevní vřava. Volební boj."

„Živel!"

„Rozkacené živly. Živelný odpor. Nekalé živly. Živili junáci! Živio!"

„Tak dost," zadržel ho C. G. Rouss. „Člověče, vy jste od novin, že?"

„Ano prosím," řekl pokusný muž horlivě. „Už třicet let. Já jsem redaktor Vašátko."

„Já děkuju," uklonil se suše náš slovutný americký krajan.

„Finished, gentlemen. Analajzováním představ toho muže bychom – eh, bychom zjistili, že on je jeden žurnalist. Já myslím, že by bylo zbytečné dělat ten experiment dál. It would only waste our time. Já prosím, ten experiment se nepodařil. So sorry, gentlemen."

„Ni rigardu“ ekvokis vespere en redakcio sinjoro Vašátko, trarigardante redakcijajn paperojn, „la polico do anoncas, ke ĝi trovis la kadavron de tiu Jozefo Čepelka; li estis enfosita ĉe barilo en ĝardeno de tiu Suchánek, kaj sub li ili trovis la sangmakultan sakon. Vidu, tiu Rouss tamen nur tion bone divenis! Sinjoro kolego, vi ne kredus tion: eĉ ne vorton mi diris al li pri ĵurnaloj, kaj li tute precize ekkonis, ke mi estas ĵurnalisto. Sinjoroj, li diris, vi havas antaŭ vi meritplenan, eminentan ĵurnaliston - Mi skribis ja en la referaĵo pri lia parolado: Konkludoj de nia renoma samlandano estis akceptitaj kun flata rekono flanke de iliaj fakrondoj.

Atendu, tion mi stile alĝustigu: Interesaj konkludoj de nia renoma samlandano estis laŭmerite akceptitaj kun vigla kaj flata rekono flanke de niaj fakrondoj. Tiel ĝi devas esti.“

„Koukejme,“ zvolal večer v redakci pan Vašátko, prohlížeje redakční papíry, „tak policie hlásí, že našla mrtvolu toho Josefa Čepelky; byl zakopán u plotu na zahradě toho Suchánka, a pod ním našli zakrvácený pytel. Vidíte, on to ten Rouss přece jen dobrě uhodl! To byste, pane kolego, nevěřil: já jsem mu neřekl ani slova o novinách, a on úplně přesně poznal, že jsem novinář. Pánové, řekl, máte před sebou zasloužilého, vynikajícího žurnalistu – Však jsem napsal v referátě o jeho přednášce: Vývody našeho proslulého krajana byly přijaty s lichotivým uznáním našich odborných kruhů.

Počkejte, to bych měl stylisticky upravit: Zajímavé vývody našeho proslulého krajana byly po zásluze přijaty s živým a lichotivým uznáním našich odborných kruhů. Tak to má být.“